

笠はり

## OMBRELFARADO (1)

Su Dongpo, la ĉina grandulo, ekzelite suden, vagadis kun ombrelo sub ĉielo, sub ŝvebantaj nuboj. Ĉe Du Fu, la granda poeto, sur la ombrelo tavoloĝis neĝo de la ĉielo de ĉina provinco Wu. Mi, dum spleno en herba ĥato, faras ombrelon per propra mano, ŝmirante ĝin per akvomezista ŝibuo. Tiele mi imitas bonzon-poeton Saigyou, vojaĝirantan solece kun ombrelo.

Vivi en la mondo estas

Kvazaŭ la provizora rifuĝo de pluvo sub ombrelo,

Kiel versita de Sougi

[Yo ni huru mo sarani Sougi no yadori kana]

Basyoo, la vaganto ĉe la rivero [1682]

## OMBRELFARADO (2)

Sola en la herba ermitejo, dum trista blovado de aŭtuna vento, mi mem faras ombrelon, kun skulptilo, imitante la ĉiziston Myoukan, bambuon disfendante kaj fleksante, kiel la fabela avo de bambuaĵo, kaj mi nomas min ombrelfaranta avo. Pro mallerta mantekniko ĝi ne tuj kompletigās. Al mi estas maltrankvile, tial mi tedas dum tagoj pasas. Ĉiumatene pripaperadas kaj ĉiuvespere denove algruas paperon sur la jam sekiĝintan. Tinkturas la paperon per ŝibuo-tanino kaj iomete lakas por firmigi ĝin. Post 20 tagoj la ombrelo estas finfarita. Ĝia unu rando kurbiĝas suben kaj la alia supren, tio ja similas al duonfloranta lotuso. Ĝia formo estas pli interesa ol la ekzaktefarita. Al mi ĝi ŝajnas kvazaŭ la povra ombrelo de Saigyou aŭ la ombrelo de Su Dongpo, kovrita de neĝo.

Nu, mi iru vidi la roson en la kampo de Miyagino. Mi iru, apogante sur bastonon, sub la neĝo en la ĉielo de la ĉina lando Wu. Tiel do mi senpacience atendas hajlon kaj vintran pluvon, karesante nevole kun speciala ekscito mian ombrelon. Ekscitate, mi tuj eksentis ion. Denove mi ekploris pro la poemo de Sougi pri vintra pluvo, kaj, preninte mem tuĉpenikon, skribis en la ombrelon jenan hajkon.

Vivi en la mondo estas

Kvazaŭ la provizora rifuĝo de pluvo sub ombrelo,

Kiel versita de Sougi

[Yo ni huru mo sarani Sougi no yadori kana]

Skribis Tousei.

[Kvina jaro de Genroku, 1692]

笠やどり

## RIFUĜO DE PLUVO SUB OMBRELO

Su Dongpo, ekzilite suden, sub nuba ĉielo metadis sur kapo ombrelon kaj, rezigninte sian ŝtatoficon, svingadis pluvmantelon. Ankaŭ Saigyō deĝnis rifuzi de pluvo sub ombrelo, vagadante pro nenionfarado. Tiel do iliaj ombreloj estas amaraj kaj karaj. Maljunecon kovras la ombrelo de umefloroj, onidire, plektita de birdo-ugviso. Kiam la oldulo vizitadas sekrete sian amatinon, la ombrelo povas kaŝi lin, kaj, kiam survoje abrupte pluvas, la ombrelo fariĝas samtempe rifuĝejo de pluvo. Se vi vidas dum pluvado tiun, kiu almenaŭ faras sian kubuton ombrelo, diru al li: “Vole prenu ombrelon!”

Mia ombrelo, samkiel ombrelo de lotusa folio, estas simpla. Ĉi tiu ombrelo estas nek pompa, nek bela. Ĝi nur similas al forĵetita sur kampo ĉifonfiguro-timigilo, rompita per vento kaj vundita de pluvo. Posedanto de ombrelo ankaŭ atendas pluvon kaj venton nur kun elĉerpita pasio.

Vivi en la mondo estas

Kvazaŭ provizora rifuĝo de pluvo sub ombrelo,

Kiel versita de Sougi

[Yo ni huru wa sarani Sougi no yadori kana]

Hakusendo Basyō

[1681]

### **Rim.**

Sougi(1421-1502) versis:

Vivi en ĉi tiu mondo

Estas ja tute egale

Al dumtempa rifuĝo de vintra pluvo

[Yo ni huru wa sarani sigure no yadori kana]

Sougi sekvas post la poemo de Nizyōin Sanuki, kiu versis jene:

Kvankam vivi en la mondo estas ĝene,  
Taman facile trapasas unua vintra pluvo  
Sur la kabano el podokarpo.

[Yo ni huru wa kurusiki mono wo maki no ya ni yasuku mo suguru  
hatu sigure kana]